

La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 20 – Julio – Aŭgusto – Septembro

ISSN 0986 – 1181



Ĉefartikolo

”Korpuso”?



Okaze de iu mia prelego mi havis interesan interparolon antaŭ la publiko kune kun lingvisto. Tiu asertis, ke Esperanto, se ĝi vere estas vivanta, kaj do evoluas, nepre estos submetita al diversaj centrifugaj fortoj : ĉiu per la forto mem de la aferoj enkondukos parolmanierojn, sintaksajn elementojn aŭ eĉ vortojn el la propra lingvo. La bela unueco de l' komenco forvaporigos . . .

Tiam mi respondis, ke ni havas lastanalize la Fundamenton kaj ke la Esperantistoj rekonas la verkojn de Zamenhof kaj strebas imiti ilian stilon. La Plena Analiza Gramatiko science observis la lingvon de Zamenhof kaj ĉiu povas konsulti ĝin. La Plena Ilustrita Vortaro registris la vorttrezoron de Zamenhof kaj de aliaj bonaj aŭtoroj. La tuta verkaro de Zamenhof estas reeldonita kaj ĉiu povas ĝin legi . . .

La lingvisto lakone respondis : Do, vi havas korpuson! Tiam la tiel preparolata facileco estas dubinda!

Eblas alporti al tio kelkajn komentojn.

Unue, se iu, eĉ lingvisto, ne praktikas la lingvon, li ne povas sane juĝi ĝin. Pro tio Zamenhof ne tro volis atenti la dirojn de la lingvistoj.

Due, efektive ni devas elekti aŭ la centrifugajn fortojn, el kiuj la lingvisto citis nur la plej evidentan por eksterulo, aŭ male la centripetan forton konsistantan el la respekto al la Fundamento konsiderata kiel la kerno de la tuta verkaro de Zamenhof.

Trie, ni devas konscii pri la aliaj centrifugaj fortoj kaj elserĉi ilin. Sed mi volonte citus la vastigon de la influo de nacia lingvo; nome, la influon de la individuismo : individuo pro personaj konceptoj eltiritaj el diversaj horizontoj eksteraj al nia lingvo (momenta aŭ daŭra modo al feminismo, malŝato al ĉio reganta aŭ simple estranta, fanatismo pri absoluta ”logiko”, ktp, ktp . . .) volas trudi diversajn morfeojn aŭ eĉ fonemojn, sintaksajn aŭ aliajn regulojn al nia lingvo.

Preter tio mi donu mian skeman difinon pri la bonaj aŭtoroj, ĉar mi aludis ilin. Ili verkas tradicie, t.e. evitante ĉiujn ekstremismojn el la leksiko, semantiko, gramatiko ktp. Unuvorte ili verkas kiel Zamenhof kaj liaj sekvantoj : klare, internacie kaj kompreneble. Tio ne ekskludas necesajn novismojn. Sed eble iu donos pli bonan difinon. Cetere la Iniciatoro skribis : ”Pro la bono de nia afero estas dezirinde, ke la Esperantistoj kiel eble plej imitadu mian stilon”.

D-ro André ALBAULD

**OFICIALAJ INFORMOJ
DE LA
AKADEMIO DE ESPERANTO
n-ro 16 (Septembro 1992)**

Sendependa Lingvo-Institucio fondita de D-ro L. L. Zamenhof en 1905

Reelekto de la Estraro

La kunveno de "La Amikoj de la Akademio", okazinta en Parizo la 4-an de Julio 1992 protokolis la faritajn voĉdonojn kaj konstatis, ke laŭstatute La Estraro kaj la Direktoraro estas senmanke reelektitaj.

Por la Akademio ties prezidanto,
D-ro André ALBAULT



Kroniko de la Nuntempo

EN LA 105-A ESPERANTO-JARO

Post unu jarcento da lingva vivanteco pli kaj pli elŝprucas al la Akademio de Esperanto strangaj proponoj . . . Jen unu kun la preteksto defendi la virinan sekson deziras forviŝi la in-sufikson. Jen alia bezonas pluralojn por vi ("ivi") kaj por io kaj kio, kvankam por ĉi-lastaj ili jam ekzistas, eĉ se ne ofte uzataj! Ja ĉu ne skribis D-ro L. L. Zamenhof: "Lia potenco konsistas el diversaj ioj, el kiuj ĉiu aparte estas ne grava, sed ĉiuj kune donas al li grandan forton"?

Jen unu konsideras, ke la Plena Ilustrita Vortaro, kiu dum tiom da jardekoj registris la uzatecon de la lingvo, plene deviis el la ĝusta vort-trezoro; kaj ĉi ti-un li pretendas *remodeligi* . . . laŭ tio, kion li mem nomas "La bona lingvo"! Jen alia asertas, ke la participaj sufiksoj estas uzeblaj kiel *plensignifaj radikoj* eĉ se ĉi tiuj signifoj povas tiam rezulti el nuraj eblaj supozoj aŭ aludoj *subkomprenotaj!*

Jen unu obstinas jam de multaj jaroj pri aparta konjugacio laŭ memkompreneble aparta logika sistemo . . . evidente "pli logika" ol la tradicia de 1887! Jen alia obsediĝas pri la nepra neceso de iu nedifina artikolo *un*, kiun li mem forĝis! Jen la sama postulas ankaŭ por la Esperanta sintakso novan "konceptojn" (laŭ propra diro) interalie koncerne al la vort-akcentado ĉiam sur la unua frazvorto! Kiun koncepton li mem nomas *La bona Esperanta frazo* la ŭĉi-supre menciita ekzemplo! Kaj . . . eĉ se ĉi tiu nova frazkonstruo kontraŭas al la FUNDAMENTA EKZERCARO, kvankam D-ro L. L. Zamenhof mem

Norden kaj norde

J. H. Rosbach skribas (*La Letero n-ro 19, p. 7*) : . . . la esprimo *norde* de evidente havas du signifojn :

- 1) *pli norde ol.*
- 2) *en la nordo de.*

Probable ĝuste tiel komprenas la aferon multaj Esperantistoj, kaj la risko, ke tiu dusencaĵo povas kaŭzi miskomprenon, vere estas negranda. Tamen la gramatika sistemo de Esperanto disponigas rimedon por tute ĝin eviti per maniero propra al la lingvoj Angla kaj Rusa.

En tiuj du lingvoj (kaj certe ankaŭ en multaj aliaj) por la kazo (1) estas uzata la ideo de direkto (*Angle to the north, northward* kontraste al *in, at the north*) :

- a) *Canada is to the north of the US.*
- b) *She lived 3 miles to the south.*

Ruse tio sama estas esprimata per la direkta akuzativo (*na sever* kontraste al *na severe*); en Esperanto oni povus provi la direktajn adverbojn :

- a') *Kanado situas norden de Usono;*
Ĝenevo estas nord-okcidenten de Ĝenovo.
- b') *Ŝi loĝis je 3 mejloj suden.*
- c') *La Brita politiko orienten de Suez*
(t.e. "La Brita politiko por la regiono sterniĝanta orienten de Suez").

En PIV abundas ekzemploj pri la uzo de *norde* de por la kazo (2); male, la malmultaj ekzemploj rilatigeblaj al la kazo (1), kiujn mi trovis per supra trarigardo, estas suspektinde neklaraj : "*Sude de N. pereis la ŝipo*" (vd. ĉe sudo) – bedaŭrinde oni ne scias, kio estas *N.*, ĉu maro aŭ punkto geografia; "*Spicbergo kuŝas norde de Norvegujo*" – ambaŭ interpretoj estas eblaj : kaj *norden de la kontinenta parto de la lando*, kaj *en la norda parto de la lando*. Mi ne sukcesis trovi ekzemplon pli aŭtoritatan – Fundamentan, oficialan aŭ klasikan. Probable la kompilintoj de PIV konsciis la problemon kaj malvolis trudi ian decidon.

S. B. Pokrovskij (*Novosibirsk*)

Rimarko : *Niaj legantoj provu kaj spertu!* – Tamen mi dubas pri gramatika solvo por semantika problemo. Cetere ni memoru la difinon de la mov-akuzativo : "la akuzativo signas la
(Fino sur p. 8)

Fino de la Kroniko (de p. 2)

skribis : "*Estas la plej bone, se niaj amikoj ĉiam modeligadus sian stilon laŭ la stilo de 'La Esperantisto'*"!

Jen . . . jen tiel pluraj cerbumas, per kiu inventaĵo ili povus re-formi aŭ perfekt-igi la jarcentan lingvon : eĉ iu celus anstataŭigi iom per ete aŭ maltre, kaj altrudi nepran redukton de ĉiu fariĝi al iĝi! Kaj tiel plu!)

Verfakte la merkato de la surogatoj estas vaste malfermita kaj la in-spiroj de la modo ne-elĉerpeblaj! Sed tiom da riskoj pri disdialektiĝoj! Kaj tiam kaj tial oni rajtas demandi sin, kial poeto eĉ fama nun rigardas la Akademion kiel pasinta-tempan organizon . . . kial ankaŭ alia forlasis la Akademion . . . krom se cindroj kovas sekretan fajron!

La sugestojn pri reformoj kaj perfektigoj D-ro L. L. Zamenhof mem multajn spertis en la unuaj jaroj de la lingvo . . . Kaj tial antaŭvidante ilian senĉesan produktivon, li estigis ĝuste *LA FUNDAMENTO-n*, . . . kaj, por memori ĉi tiun, eĉ la tiucelan institucion, la *AKADEMIO-n*, kies esenco mem pli ol iam ajn restas nepre necesa por refreŝigi en ĉies spiriton la solan *unuecigan* Fundamentan Tradicion de la lingvo.

J. T.

*) *Kaj tiel plu . . . Jen proponas alia ŝanĝi eĉ la Latinan alfabeton per la Araba, kiu en liaj okuloj estas pli estetika!*

SENATENDAJ DEMANDOJ

de Claus J. Günkel (Paderborn)

D – 1. Pro l'simetrieco de *iĝi*, tiaj ĉi frazoj estas dusencaj :

Mia instruisto iĝis mia bopatro.

Pro la sorĉo, kato iĝis hundo.

Ĉu tiu viro estis unue mia instruisto kaj poste bopatriĝis? Aŭ ĉu mia bopatro poste instruistiĝis? Kaj ĉu ie estis kato, kiun oni hundigis ("hundifis")? Aŭ ĉu iu hundo katiĝis pro ies sorĉo?

"Esti" estas simetria, sed tio ne ĝenas :

Okso estas ekstaŭro.

Okso ekstaŭro estas.

Estas okso ekstaŭro.

Estas ekstaŭro okso.

Ekstaŭro okso estas.

Ekstaŭro estas okso.

Sed ni atentul! "Esti" ankaŭ povas esti ne simetria :

Pomo estas frukto. En la senco de *Ĉiu pomo estas iu frukto.* Sed ĝi ne povas havi la senco *Ĉiu frukto estas iu pomo* pensigantan al la fraz-ordo *Frukto estas pomo.*

Ĉu tie ĉi kuŝas la neceso havi (Mi nun iom fantazias!!) dusencan, kutime nesimetri-an *esti* kaj strikte simetrian *esi*? Ĉu do *iĝi* ĉiam postulas certan, ununuran vort-ordon en frazoj? Ĉu jen peketo kontraŭ la libera vort-aranĝo de nia lingvo?

R – 1. La instruisto bopatriĝis kaj la kato pro sorĉo hundigis. – *Pro la signifo de iĝi la senco-direkto estas laŭorde subjekto + predikativo; inversigi la ordon eblas sintakse sed manke de kunteksto igas la stilon malklara.*

– Pomo estas frukto – *Kiel plurfoje diris D-ro L. L. Zamenhof, antaŭ ĉio "ne enkateniĝi la lingvon"! Havigi al si du formojn "strikte simetrian" kaj "simetrian" de esti, jen komplikajo ne-necesa des pli, ke la plej kutima vort-ordo de klara stilo sen kunteksto estas subjekto + predikativo.*

(JT)

Rimarko : Ni lasas plenan respondecon al la aŭtoro pri la elekto de la ekzemploj kaj pri la vortumado. Ni tamen notu por niaj legantoj, ke la ne tre kutima vorto okso devenas el

la Angla ox aŭ el la Germana Ochs, en kiuj ĝi signifas nur bovo. Cetero tiu ŝajnas konata en aliaj Indo-Eŭropaj lingvoj : ĉefe en la Germanidaj. En Sanskrito ukšan- signifas taŭron. La sama radiko tamen estas konata ankaŭ en Latinidaj lingvoj, kiuj pruntis la Germanan Aurochse (F. H. aurochs, P. auroque, . . .), speco de bovo ankaŭ nomata uro. En Esperanto tiu aperis sub la formo aŭroko, (Vd. en la fama scienca vortaro de Verax, 1908); ĝi ja signifas uron sed estas pli akceptebla kaj oportuna ol ĝi ĉefe por la ino (urino!). Ĉiuokaze la ĝenerala ideo estas bovo, sed neniel kastrita bovo kiel en PIV.

(AA)

*

D – 2. La frazon *Elektu lin estro* ĉiu komprenas. Ĉu ankaŭ eblas ĉiuj 3! (legu "faktorialo 3", t.e. $3 \times 2 \times 1 = 6$) ebloj, do ankaŭ :

(2) *Elektu estro lin.*

(3) *Lin elektu estro.*

(4) *Lin estro elektu.*

(5) *Estro lin elektu.*

(6) *Estro elektu lin. – ?*

Ĉu ne almenaŭ frazo (6) estas dusenca?

a) *Estro! Ek! Elektu lin.*

b) *Kiel estron elektu lin.*

Se estas tri personoj, ne estas dubo : *Ĉi elektis ŝin estrino.*

Sed en la kazo de nur du personoj kun umodo, povas esti dusenceco : *Elektu ŝin estrino* aŭ *Estrino elektu ŝin.* Ĉu ankaŭ ĉi tie deviga vort-ordo?

R – 2. Ne temas pri "deviga ordo"; sintakse ĉio eblas; sed sen kunteksto (kio iagrade montriĝas artefarita) klara stilo eliminis la dubencajn konstruojn.

(JT)

Rimarko. Esperanto povas esprimi matematikajn (ankaŭ logikajn) pensojn, sed Esperanto ne estas matematiko, (nek logiko)!

(AA)

*

D - 3. Ĉu tiuj ĉi kvar frazoj estas samsinifaj / ĝustaj?

- (1) *Ŝi iĝis mia amikino.*
- (2) *Ŝi mia-amikin-iĝis.*
- (3) *Ŝi miaamikiniĝis.*
- (4) *Ŝi amikiniĝis mia*

aŭ *Ŝi amikiniĝis de mi.*

R - 3. Laŭsignife ĉiuj estas kompreneblaj; sed stile la frazoj, escepte de la unua, estas tiel nekutimaj, ke ili estas malkonsilindaj krom por afektaj celoj.

(JT)

*

D - 4. En la Germana, estas esprimmaniero por esprimi agon tute sen aganto, ekz-e, *Hier wird getanzt*. En Esperanto aŭ en la Franca, ĉi tie necesas la pronomo oni: *Ĉi tie oni dancas. Ici, on danse / On danse ici*. Ĉu ne eblas en Esperanto transpreni la Germanan strukturon? *Ĉi tie estas dancate*.

Aliaj ekzemploj: *Foireje estas vendate legomojn. Dum la Franca Revolucio, multajn nobelojn estis senkapigite. Sur Germanaj aŭto vojoj, estas freneze akcelate.*

Simila strukturo en la Franca estas la transiraj verboj kun *se (= si)*. Ekzemploj: *Du poisson avec du miel, ça se mange pas. Qu'il est impoli, ça se voit*. Ĉu tiaj ĉi strukturoj estas kutime kun *iĝ* en la Internacia? *Fiŝo kun mielo ne manĝiĝas. Ke li estas malĝentila, vidiĝas.*

Ĉu en la ni diru ate/ite/ote-strukturoj kuŝas nuanco de ĉiameco aŭ/kaj unufojeco / nur-nun-eco? Ĉu tiuj ecoj kuŝas en la ĉi-supraĵaj iĝ-strukturoj?

Alivorte: kiu diferenco estas inter ĉi tiuj frazoj?

- (A) *Fiŝo kun mielo ne manĝiĝas.*
- (B) *Fiŝon kun mielo ne estas manĝate.*
- (C) *Fiŝo kun mielo ne estas manĝata.*
- (D) *Fiŝon kun mielo oni ne manĝas.*

R - 4. Ĉi tie estas dancate. Kvankam nek kutima nek klara, la frazo restas ĝusta sintakse; sed kial ne pli simple: oni dancas, aŭ estas danco(j), balo?

Foireje estas vendate legomojn. La pasiva formo iĝas subjekto laŭsence la vorton legomojn, kaj la akuzativo ŝokas! Kial ne: estas vendataj legomoj?

... multajn nobelojn estis senkapigite.

Same! Akuzativo ĉe logika subjekto!

... estas freneze akcelate. Kial ne pli simple: estas freneze akceli?

La du frazoj (C) kaj (D) estas kutimaj kaj klaraj; la frazo (A) malofte restas komprenebla; sed la frazo (B) restas ja malklara kaj krome sonoras malĝuste pro la akuzativo.

(JT)

Rimarko. - . Mi raportis (*Esperantologio II, 1959: n-ro 1, p. 41-57*) pri la lingvaĵo de tri-jara denaska Esperantisteto, el kiu mi elpikas la tri esprimojn: La ŝipo estas manĝita. - La ŝipo... manĝiĝis; ĝi malmanĝiĝos, ĉu ne, Paĉjo? Mi resendas al la artikolo, ĉar kunteksto situacia kaj vorta estas ĉio.

(AA)

*

D - PS.: A) Kio estas la senco(j) de tiuj ĉi frazoj?

- (1) *Patro iĝis estro.*
- (2) *Patro estro iĝis.*
- (3) *Iĝis patro estro.*
- (4) *Iĝis estro patro.*
- (5) *Estro iĝis patro.*
- (6) *Estro patro iĝis.*

En kiuj frazoj estriĝas patro kaj kie patriĝas estro?

B) *Ĵuriano elektis lin estrarano*. Jen eĉ 4! = 24 ebloj. Ekz-e, *Lin elektis estrarano ĵuriano*. Ĉu nun iu estraraniĝis aŭ ĉu iu ĵurianiĝis?

R - PS.: A) Sen kunteksto: - estriĝas patro en la frazoj (1) (tre klara), (2) (ne kutima: pli volonte estriĝis) kaj (4) (pli klara parole ol skribe!); - patriĝas estro en la frazoj (3) (pli klara parole ol skribe), (5) (tre klara), (6) (ne kutima, pli volonte patriĝis).

B) *Iu estraraniĝis.*

*

SUME - Simetrio principe implicas matematikan nocion de egaleco, kiu plej nete montriĝas en la sintaksaj rilatoj kaj kun la verbo esti; tamen kun verbo kiel iĝi, se la simetrio restas egaleca sintakse, semantike ĝi pli similas ian vektoran nocion kun direkto, kiu dependas de la kunteksto.

(JT)

Diskutpropono pri internaciaj vortoj : kiel apliki la 15-anregulon?

La 15-a Regulo de la Fundamenta Gramatiko difinas la vortojn "fremdajn" kiel tiujn, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto. Kiom da lingvoj estas plimulto? Neniu precize scias, kiom da lingvoj ekzistas. La nombro de la lingvoj parte dependas ankaŭ de arbitraj difinoj, ĉar ne estas klara limo inter lingvoj kaj nuraj dialektoj. Ĉiukaze pluraj miloj da lingvoj. Jam en Eŭropo ekzistas ĉirkaŭ 120 diversaj lingvoj. Do, se ni tute laŭvorte prenis la regulon, ĝi estus praktike ne aplikebla. Certe Zamenhof ne volis doni neaplikeblan regulon, kaj fakte li ja iel aplikis ĝin; tial ni, konforme al la norm-sciencaj metodoj, devas restrikte interpreti liajn vortojn; ni devas trovi la limigojn, kiujn li subkomprenis. La t.n. *gramatika interpretado* (fakte temas pri semantika interpretado) ĉi tie kondukas al, laŭ mi, kontentiga solvo. Tamen bonvole rigardu la ĉi-subajn konsiderojn nur kiel diskutproponon. Por tute forigi ĉiujn dubojn pri ĉi tiuj demandoj ni verŝajne bezonus oficialan "Aldonon al la Fundamento".

En la Unua Libro Zamenhof donis por la kreado de vortoj i.a. tri regulojn, kiuj povas helpi en ĝusta maniero restrikte interpreti la 15-an Regulon. Jen mi citas ilin :

§1. *La vortaron mi kreis ne arbitre, sed kiom eble el vortoj konataj al la tuta klera mondo. . . . Tiamaniere ĉe korespondado kun meze-klera Eŭropano, kiu tute ne lernis la lingvon internacian, mi povas esti certa, ke li ne sole min komprenos, sed eĉ sen bezono tro multe serĉadi en la vortaro, kiun li uzos nur ĉe vortoj dubaj.*

§2. *Vortojn, kiuj estas egale uzataj en ĉiuj civilizitaj lingvoj (la tiel nomatajn 'fremdajn' kaj 'teĥnikajn'), mi lasis tute sen ia ŝanĝo.*

§3. *El la vortoj, kiuj en malsamaj lingvoj sonas malegale, mi prenis aŭ tiujn, kiuj estas komunaj al du aŭ tri plej ĉefaj Eŭropaj lingvoj, aŭ tiujn, kiuj apartenas nur al unu lingvo, sed estas popularaj ankaŭ ĉe la aliaj popoloj.*

Krome, en §1 de la propono pri Regularo de la Ligo Internacia de Esperantistoj (1890) li skribis :

La fina celo de la ligo estos atingita tiam, kiam por ĉiu homo estos sufiĉe, sciŭ ekster sia propra lingvo nur la lingvon neŭtrale homan, por jam sen bezono de ia alia lingvo povi libere kompreniĝi kun la tuta civilizita mondo.

Kion tiuj ĉi reguloj instruas al ni? Zamen-

hof, sekvante la pensmanieron de la 19-a jarcento, ĉe "lingvoj" emis subkompreni "civilizitaj". Pri kiuj lingvoj do temas? "Civilizita" en la tempo de Zamenhof iel inkludis "Eŭropa" aŭ "Kristane-Okcidenta". Inter tiuj "civilizitaj lingvoj" troviĝas elstara grupo : nome, la "plej ĉefaj Eŭropaj lingvoj". Plue, Zamenhof, kvankam dirante "ĉiuj" en §2, certe ne konsideris vere ĉiujn ĉ. 120 Eŭropajn lingvojn, sed nur la ne tute malgravajn. Ni ekkomprenas, ke laŭ Zamenhof oni devas ne simple nombri, sed ankaŭ pesi la lingvojn. La vera mezurilo de la internacieco de vorto ne estas la nombro de la lingvoj, al kiuj ĝi apartenas, sed la nombro de homoj, kiuj konas tiun vorton. Supozeble vorto troviĝanta en tri lingvoj parolataj de 690 milionoj da homoj estas iusence pli "internacia" ol vorto troviĝanta eĉ en dek lingvoj parolataj nur de kelkaj centmiloj. La celo ja estas, ke Esperanto konsistu el kiel eble plej vaste konataj vortoj; el vortoj, kiujn la plimulto de "meze-kleraj Eŭropanoj" jam konas.

Plie, nia interpreto estas apogata de la fakto, ke Zamenhof ne multe sciis kaj konsideris ekstereŭropajn lingvojn, ekzemple la lingvojn Ĉinan, Japanan, Araban, Hindiajn ktp.; tamen li ne hezitis — ankaŭ ne post la leĝigo de la Fundamento —, nomi iun tuteŭropan vorton "fremda" aŭ "internacia", kvankam ĝi estas nekonata al la plejmulto de la ĵus menciitaj lingvoj.

Nun ni povas reformuli la 15-an Regulon, eksplicite enmetante tion, kion Zamenhof subkomprenis : *La tiel nomataj vortoj 'fremdaj', t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la Eŭropaj lingvoj — pesitaj laŭ la nombro de siaj parolantoj — prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo internacia sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; . . .*

Tiu ĉi formulo eble aspektas malplaĉe Eŭrocentrisma, tamen ĝi ankoraŭ hodiaŭ estas praktike akceptebla. Ja estas fakto, ke laŭ ĝi la 'fremdaj' vortoj de Esperanto estas unuavice tuteŭropaj, sed ne nepre jam tutmondaj. Sed pri pensu : la Eŭropaj lingvoj almenaŭ estas grava parto de la lingva mondo. Ne nepre ĉiu tuteŭropa vorto estas ankaŭ tutmonda; sed ĉiu tutmonda vorto verŝajne estas ankaŭ tuteŭropa. Do, la tutmondeco de nia lingvo neniel suferas, sed gajnas ĝiaj unueco kaj stabileco, gajnas la amplekso de ĝia ĝenerale akceptata vortaro.

Krome mi rekomendas legi la argumentojn de Zamenhof kontraŭ la riproĉo, ke Esperanto "ne estas sufiĉe internacia"; vd. LR 51. Tie li aprobe karakterizis nian vortaron ne simple kiel

tuteŭropecan, sed kiel "sistemon Romana-Germanan".

Mi volas emfazi, ke la supre formulita regulo tute ne malhelpas, ke ankaŭ ne-Eŭropaj vortoj eniru en la esperanto-vortaron. Ĉiu rajtas proponi kaj ekuzi vortojn el ne-Eŭropaj lingvoj, kondiĉe ke ne temas pri sinonimoj de Fundamentaj aŭ Oficialigitaj vortoj. Sed internaciaj vortoj en la senco de la 15-a Regulo "plene apartenas al nia lingvo jam de la unua momento de ĝia naskiĝo" (LR 52), eĉ kiel sinonimoj de Fundamentaj aŭ Oficialigitaj vortoj.

Sen la supre eksplicitigitaj subkomprenajoj, eble ne tre plaĉaj, la statuso de multaj vortoj fariĝus duba; kiel dirite, sinonimo de Fundamenta aŭ Oficialigita vorto estas permesata nur, se temas pri internacia vorto. Do, se oni ne (aŭ ne plu) akceptus la supre donitan interpreton, tiam povus okazi, ke delonge uzataj vortoj perdus sian ekzistorajton en Esperanto. Nur la Akademio tiam povus savi ilin per oficialigo.

Por helpi pli bone "pesi" la lingvojn, mi ĉi tie donas tabelon:

Kiel gepatran lingvon parolas laŭ statistiko de 1987 (en milionoj da parolantoj)

la Hispanan	315
la Anglan	310
la Rusan	155
la Portugalan	120
la Germanan	90
la Francan	75
la Italian	60

Entute e. 1320 milionoj da homoj parolas Eŭropajn lingvojn kiel gepatrajn; la supre listigitaj plej ĉefaj Eŭropaj lingvoj kune ampleksas jam e. 85 % de la tuta parolantaro de Eŭropaj lingvoj. Pli ol 660 milionoj signifas la plimulton laŭ la 15-a Regulo. tre ofte jam tri lingvoj sufiĉas por certigi la statuson de internacia vorto.

Se oni sisteme traserĉus tiujn sep plej ĉefajn lingvojn, tiam oni povus supozeble tre rapide kaj sisteme generi, eble helpe de komputoroj, ampleksan vortaron de internaciaj vortoj, eĉ tre novaj kaj aktualaj, kaj eĉ tre specialaj. Tiu ĉi povus esti granda paŝo al, kaj grava parto de la Provizora Vortarego arde sopirata de Zamenhof (vd. LR 55). Ĝi enhavus "ne sole ĉiujn vortojn de la ordinara vivo, sed ankaŭ ĉiujn vortojn teknikajn de ĉiuj sciencoj, artoj kaj metioj, ĉiujn nomojn geografiajn, historiajn, personajn ktp". Ĝian plenan unuecon garantius la priskribita sistemo mem; oni ĉiam prenu la formon de la komuna fontolingvo kaj donu al ĝi la ortografion de la lingvo internacia.

Eĉ se oni ne akceptas nian reformuladon de la 15-a Regulo de la Fundamenta Gramatiko, ĝi

estas ĝusta almenaŭ por la eksterfundamenta "Zamenhofa stilo", kiu estas ne deviga, sed oficiale rekomendata de § 4, frazo 5, de la Bulonja Deklaracio. Tial oni tute bone jam nun povas verki, laŭ la priskribita maniero, Provizoran Vortaregon, sen atendi decidon de la Akademio, kiu forigus ĉiujn eventuale restintajn dubojn. Oni devas nur priatenti la malpermeson de sinonimoj de jam oficialigitaj vortradikoj, ĉar tiam ja ne temas pri sendube internaciaj vortoj, sed nur pri neoficialaj vortoj generitaj laŭ la Zamenhofa maniero. Mi forte rekomendas tuj eklabori.

Nota de la Redakcio. Ne seninteresa estas tia komento de la 15-a Regulo de la Fundamento, sed . . . pri la konkluda "rekomendo", ĉu ne altrudiĝas la demando: kial devanci la etapojn de la lingva vivo?

"Fremda" vorto bezonas tempon por enradikiĝi en lingvon: ne sufiĉas unufoja ekuzo de la vorto por pravigi ĝian ekzisto-raĵon . . . eĉ okazas, ke neologismo furoras dum periodo kaj subite malaperas sen evidenta kaŭzo; ekzemple la vorto neksta estis tre ofte uzata dum la 60-aj jaroj en preskaŭ ĉiu gazeto, kaj ĝi abrupte falis en la forgesujon de la arĥaismoj, kiel tio estis antaŭvidita de D-ro L. L. Zamenhof. Kial? Jen kio estas malfacile klarigebla: verŝajne pro influo de lingva modo, kaj eble ĉar ekzistas jam multaj sinonimoj de la nocio neksta, kiel proksima, najbara, venonta, apuda, tuja, ĉea . . . ktp. ĉiu kun sia aparta nuanco.

La menciita statistiko de 1987 havas ja relativan valoron, cetere kiel ĉiuj statistikoj! Ekzemple la jarlibro Quid 1992 (tre konata en Francio) publikigis statistikon de 1991 havigitan de Sidney S. Culbert el la Universitato de Wellington, laŭ kiu statistiko en milionoj da parolantoj la Anglan uzas 445, la Hispanan 351, la Rusan 292, la Portugalan 175, la Francan 121, la Germanan 118 kaj la Italian 63 . . . (kio post nur tri jaroj prezentas ian diferencon!)

Tial la ellaborado de Plena Vortarego (eĉ provizora!) ne tiel urĝas, kiel ŝajnas aserti la konkludo. "Se tian grandampleksan fiksitajn vortaregon, kiun povas krei nur tre longa kaj ĉiufanka uzado kaj elprovado, ni volus pretigi teorie kaj 'en rapideco', ni tre danĝere enkatenu nian lingvon, ni malpermesus al ĝi libere kaj sane disvolviĝi . . ." (LR 55 - D-ro L. L. Z.)

(JT)

Rimarko. La ĉefa kritiko aldonenda al tiu noto de la Redakcio estas jena: necesas konsideri la diversajn kategoriojn de "internaciaj vortoj". La propraj nomoj (Welger, Albault . . .) estas aŭtomate internaciaj kaj principe sensange uzataj en la tuta mondo, (krom esceptoj!). Same por la geografiaj nomoj. Tamen atentinda kategorio, nepre aparte traktenda, estas la landnomoj. Ili havas tre ofte sian apar-

(Welger)

tan formon en ĉiu lingvo; do, preni la landan formon tre ofte liverus malinternacian formon; sed ili havas sian internacian formon, kiu tre vaste jam penetris en Esperanton; do sekvi la konsilon de Welger por ili tre ŝanĝus, krome, niajn kutimojn. Ni konsideru nun la teknikajn medicinajn vortojn : por ili oni sciu, ke estas tri ĉeflingvoj, nome, la Angla, la Franca, la Germana. Sed por anatomiaj vortoj oni aldo-

nu kvaran lingvon, eĉ kiel ĉefan : la Latinan, bazon de la oficiala internacia nomenklaturato; en multaj lingvoj ne estas uzata la traduko de tiuj vortoj, sed la Latinajn mem. Tiuj kelkaj ekzemploj sugestas, ke la afero estas iom pli komplika, ol ŝajnas unuavide. Ĉiu fakulo verŝajne volos aldoni similan komenton pri sia fako! Tion kaj multon alian oni devas studi paŝon post paŝo, neniel en rapideco! (AA)

(Pokrovskij)

celon de la movo". Do frazo, kia Ĝenevo situas norden de . . ." estas gramatike ne korekta : ne ekzistas movo kaj do ankoraŭ malpli celo de movo! — Ĉu ne pli simple prove diri : Spicbergo situas norde de Norve-

gio; Kanado kuŝas norde de Usono. Malfacilas trovi klaran sinonimon por tio! Por la alia senco ni diru tute klare : en la sudo de Francio; en la nordo de Italio. Per tio ni uzas apartenecon de. (AA)

Demandoj faritaj dum la publika kunsido de Akademianoj (UK, Vieno 1992)

D. — Ĉu validas egale kaj "astronaŭto" kaj "kosmonaŭto"?

R. — Ambaŭ vortoj ekzistas kun la sola diferenco, ke "kosmonaŭto" estas pli freŝdata ol "astronaŭto", kiu tamen ankoraŭ ne arkaismiĝis; kio unu plian fojon montras la lingvan vivantecon. (JT)

*

D. — Ĉu ekzistas aŭ re-ekzistas la vorto "kakaĵo" en Esperanto?

R. — "Kaki" en Esperanto ekzistas nek en PIV nek en la Suplemento de 1987 tamen la vor-

taro Esperanto-Franca de G. Waringhien (1955, 1976) ĝin mencias kun la indiko " = fe-ki"; sed "kaki" troviĝas en diversaj vortaroj Esperanto-Angla, -Bulgara, -Germana, -Hispana, -Japana, -Korea, -Pola, -Portugala, -Rusa, -Serbokroata, -Slovena . . . Sekve la vorto malnova el la Latina (cacare) restas ŝajne ankoraŭ uzata. (JT)

*

D. — Ĉu Pekino aŭ Beijing?

R. — "Pekino" estas la internacia formo de la vorto almenaŭ ĝis nun; "Beijing" la Ĉina ("pin-jina" [pinyin]) ortografio. Cetere oni prononcu tiun Ĉinan vorton proksimume : b(p)ejĉing.

(JT)

LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO. Trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. — Redaktoro : Jean THIERRY. — Direktoro de la publikaĵo : André BOURDEAUX. — Presejo : COCONNIER, 72300 SABLÉ. — C.P.P. : n-ro 6971. — Prezo : 1 n-ro : 40 FRE — Jara abono : 120 FRE — Pagebla : ĉe kontoj : Banka : Crédit Lyonnais n-ro 7090 F — Poŝtĉeka : 735 27 B Paris. — UEA : Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝirofiĉejo Den Haag) : nepre indiku "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto".

Perantoj por diversaj landoj :

Aŭstralio : Libroservo de AEA, Post Office Box 230, MATRIVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

Azio (tuta) : S-ro UMEDA Yosimi, L.P.O.B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Brazilo : Brazila Esperanto-Ligo : ScS Ed Jockey Club — Sala 103. BR 70300 BRASILIA DF (Caixa Postal 11 11 05), Brazilo.

Germanio : S-ro Claus J. GÜNKEL, Im Lichtenfelde 70, D W 4790 PADERBORN, Germanio. Poŝtĝiro Hannover (bankkodo 250 100 30), konto-n-ro 5706 31-301.

Kubo : S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-o-Redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

Meksiko : S-ro Enrique LEMUS Rodriguez, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DE Meksiko.

Svedio : Sveda Esperanta Federacio : c/o Lisbet ANDREASSON, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono : Eldonejo Bero : P.O.Box 13492, BERKELEY CA 94701, Usono.